**Luminesk‘ - la silvestra rekontiĝo de Germana Esperanto-Asocio**
**28-a de decembro 2024 ĝis 3-a de januaro 2025**
**Bielefeld**

## Dua informilo

Proksimiĝas la momento decidi pri viaj planoj por la jarŝanĝo 2024/2025. Kaj proksimiĝas la limdato (31-a de oktobro), post kiu aliĝo al la silvestra-novjara renkontiĝo Luminesk’ fariĝos iom pli kosta. Do decidu kaj aliĝu! Alvena tago denove estos la 28-a de decembro, forira tago la 3-a de januaro.

## Kunvenejo

Ĉi-foje ni elektis la universitatan urbon Bielefeld (340.000 enloĝantoj) en orienta Vestfalio. Ĝi estas facile atingebla (ankaŭ per rapidaj trajnoj) kaj situas meze inter Hannover kaj Düsseldorf. Luminesk’ okazos en la nove konstruita junulargastejo (Jugendgästehaus) proksime al urbocentro kaj fervoja stacio. Parto de ĝi iam servis kiel biciklofabriko. Tramhaltejo « Dürkopp Tor 6 » estas antaŭ la domo. Disponeblaj estas dulitaj aŭ unulitaj ĉambroj, ĉiuj kun propra banĉambro. La kotizo kiel kutime enhavas ĉiujn manĝojn kaj silvestran bufedon kun trinkaĵoj.




## Programo

Validas la ĝenerala programskemo ĉe https://www.esperanto.de/luminesk. Ne ĉiuj partoj de la programo jam estas definitive fiksitaj. Certas tamen ke en la kadro de Luminesk’ denove okazos la Internacia Vintra Universitato (IVU) organizita de Amri Wandel kun diversaj sciencaj prelegoj. Christof Roether prelegos pri speciala relativeca teorio. Barbara Brandenburg informos pri la familia entrepreno Dr. Oetker, kaj ŝi enkondukos la lokan manĝaĵon «Pickert». Kristin Tytgat denove gvidos paroligan Esperanto-kurson. Guido Brandenburg prezentos la verkojn de la kantpoeto Hannes Wader (kiu devenas el Bielefeld). Pluraj partoprenantoj jam proponis pliajn programerojn. Kiel en la pasintaj jaroj ni denove prezentos la lokon de la venonta Universala Kongreso, por 2025 do Brno en Ĉeĥio. Dum silvestra vespero koncertos «La perdita generacio», konata muzikgrupo el Svedio. La grupo ankaŭ alimaniere kontribuos al la programo. Post la vesperaj programeroj denove eblos kunveni en kombinita gufujo kaj knajpo kun diversaj trinkaĵoj.





## Ekskursoj

La 30-a de decembro restos la ĉefa ekskursa tago (sen paralela programo). Sed por eviti troajn kostojn ni denove rezignos pri aŭtobusado al fora loko. Anstataŭe ni proponas plurajn ekskursojn al celoj facile atingeblaj per publika trafiko (ne forgesu vian 49 €-bileton, se vi havas) aŭ eĉ piede en la proksimeco de la kunvenejo. La 30-an matene okazos gvidado tra la urbocentro. Post la tagmanĝo la saman tagon sekvos vizito al la entrepreno Dr. Oetker, kiu famiĝis per bakpulvoro, pudingo kaj aliaj nutraĵoj (kaj trinkaĵoj). La 1-an de januaro la novjara promenado sub gvido de Sebastian Hoffmann kondukos nin al la fortikaĵo Sparrenburg super la urbocentro. La 2-an de januaro posttagmeze ni antaŭvidas du paralelajn ekskursojn: unu al la konataj socialaj institucioj de Bethel kaj alia al la historia muzeo. La muzeo ilustras ĉefe la industrian evoluon de Bielefeld, iama centro de teksaĵindustrio kaj maŝinkonstruado.

© Teutoburger-Wald-Tourismus





## Aliĝu baldaŭ, se vi ne jam faris

Aliĝu plej facile per la retpaĝo de Germana Esperanto-Asocio (www.esperanto.de), sed eblas ankaŭ papere. Se vi aliĝas antaŭ la 31-a de oktobro, vi pagos 560 € por restado en dulita, 700 € por restado en unulita ĉambro. Nemembroj de GEA loĝantaj en Germanio pagos aldone 30 €. Aliĝo validas post ricevo de antaŭpago (minimume 50 €).
Pagu al la konto de Germana Esperanto-Asocio, IBAN : DE53 5085 1952 0040 1158 42 ĉe Sparkasse Odenwaldkreis, BIC: HELADEF1ERB aŭ per la UEA-konto geaa-n. Kaj ne forgesu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ la komenco de la aranĝo. Ek de la 1-a de novembro la kotizo altiĝos al 585 respektive 730 €. Ni rekomendas aliĝi baldaŭ, des pli ĉar post la 25-a de novembro GEA devos redoni ne bezonatajn ĉambrojn por eviti financan perdon, kaj tial ne plu povos garantii al vi lokon.

## Ĝis revido en Bielefeld!

Ĉiam denove disvastiĝas duboj, ĉu entute Bielefeld ekzistas. Neniu ĝis nun pruvis la kontraŭon, kaj via partopreno en Luminesk' estas perfekta okazo mem eltrovi la veron.

*La organiza teamo: Andreas Diemel, Barbara kaj Ulrich Brandenburg*